


Lim-aranĝo en SupraMalDekstra valoras iom malpli ol 14 poentoj.


Ni transiru al la SupraMalDekstra angulo.




Diag. 16 Nigro 'rektanguliĝas' sur 'du-du' punkton. Tio ofte aperas en realaj ludoj, sed kalkuli la valoron estas sufiĉe malfacile, ekzistas iaj kazoj en kiuj eĉ profesiuloj ĝeniĝas. Ĉi tiu kalkulo estas unu el la plej malfacilaj rim-aranĝaj kalkuloj.

Ordinare oni diras ke "Tiu ĉi meto valoras je 14 poentoj da diferenco." Strikte, en multaj kazoj la valoro estas malpli ol 14 poentoj. Sed ĉi tie ni ne obstinas en la strikteco, sed pensu kial kalkuliĝas la nombro 14 poentoj.

{paĝo 52 de la origino}




Diag. 17 B1,... Laŭ kutimo ni komparu kun tiu ĉi lim-aranĝo.




Diag. 18 Sekvante, Blanko povas metrajton-tenante 'bati-kaj-sinligi' kiel B1 kaj B3, kaj rezultas la procedo ĝis N4.

Aliflanke, kia formo rezultas kiam Nigro lim-aranĝas per N1 en diagramo 16?

Se la formo estus facile farita, ni povus kalkuli la diferencon. Sed en la kazo de diagramo 16, ambaŭ Nigro kaj Blanko ne havas rimedon por metrajton-tenanta lim-aranĝo, do ni ne povas supozi rezoneblan rezulton. Konkrete, post diagramo 16,...



Diag. 19 (metrajton-perdanta) Ambaŭ Nigra ‘tranĉo-kaj-forkapto’ kaj ...




Diag. 20 (metrajton-perdanta) Blanka sin-ligo estas metrajton-perdantaj. En ĉi tiaj kazoj, ni kalkulu la mezon inter diagramo 19 kaj 20. Kaj komparante la ‘mezon’ kun diagramo 18, ni kalkulu la poenton de lim-aranĝo ĉi tie.


Nu realigu.

{paĝo 53 de la origino}

Post diagramo 19,...




Diag. 21 Nigro metrajton-tenante batas kiel N1.




Diag. 22 Sekve procedas ekde B2 ĝis B6. Kiel ĉi tio, en kazoj ke nur unu flanko povas metrajton-tenante lim-aranĝi, principe estas kalkuli poentojn supozante, ke la flanko uzos la rajton por la lim-aranĝo.

Aliflanke, post diagramo 20,...




Diag. 23 Por kalkuli ni supozu, ke metrajton-tenanta estas Nigra 'suben-iro' N1. Sekvante Nigro povas rim-aranĝi tuŝmetante kiel N-a. Kontraŭ ĉi tio Blanko ne povas disigi nigrajn ŝtonojn per B-b, ĉar Nigro kaptus la blankan ŝtonaron per tranĉo N-c.




Diag. 24 (prava rezulto) Do prave estas supozu, ke Blanko respondos kiel B2. Diagramo 22 rezultas de diagramo 19, kaj diagramo 24 rezultas de diagramo 20. Kiel ni kalkulu la mezon inter la du diagramoj?

{paĝo 54 de la origino}




Diag. 25 Pri diagramo 22, supozante limojn sur punktoj markitaj per 'X', Nigra teritorio nombriĝas 11 poentoj, kiel sumo de 9 poentoj da punktoj 'a' kaj 2 poentoj da punkto 'c' (spuro de forkapto), kaj Blanko teritorio nombriĝas 2 poentoj da punktoj 'b'.




Diag. 26 Pri diagramo 24, supozante limojn sur punktoj markitaj per 'X', Nigra teritorio nombriĝas 8 poentoj da punktoj 'a', kaj Blanko 9 poentoj da punktoj 'b'.

De supra nombrado, la meznombroj inter la du diagramoj kalkuliĝas kiel jene; Nigra teritorio = $9,5$ poentoj ($(11+8) / 2$), Blanko teritorio = $5,5$ poentoj ($(2+9) / 2$)

Tiel estas kalkuli la mezon. La numeroj $9,5$ poentoj kaj $5,5$ poentoj estas,...



Diag. 27 (re-apero de diagramo 16) Teoria rezulto kiam Nigro lim-aranĝas kiel N1.



Diag. 28 {Por nombrado en diagramo 18} Ĉi tiu estas rezulto de Blanka lim-aranĝo. Same supozante limojn sur punktoj markitaj per 'X', Nigra teritorio nombriĝas 3 poentoj da punktoj 'a', kaj Blanka 13 poentoj da punktoj 'b'.

Re-aranĝante la supraĵn numerojn kalkuliĝas kiel jene.


{paĝo 55 de la origino}

Kazo 1 kiam Nigro lim-aranĝas: Nigra = 9,5 poentoj, Blanka = 5.5 poentoj,


Kazo 2 kiam Blanka lim-aranĝas: Nigra = 3 poentoj, Blanka = 13 poentoj.

Inter la du kazoj, Nigra teritorio diferencas je 6,5 poentoj kaj Blanka teritorio je 7,5 poentoj.

Sume, la nombro "diferenco da 14 poentoj" estas kalkulita.



Diag. 29 Tial la lim-aranĝo ĉe punkton 'a' ordinare valoras je 14 poentoj.



Diag. 30 Cetere, en ĉi tiu problemo, ĉar ekzistas ŝtono \triangle , kiam Nigro batis kiel N1 (vidu diagramon 21), Blanka respondas ne kiel B-a, sed kiel B2. Preterlasante la detalon, la valoro de la limaranĝo ĉe B6 en la diagramo 1 estas iom malplimulte ol 14 poentoj, nome ĉirkaŭ 13,5 poentoj. Kiel ĉi tio, malgranda diferenco de la formo influas la valoron de lim-aranĝoj. Eĉ profesiuloj ĉagreniĝas de ĉi tiaj kalkuladoj. Amatoroj pli bone memoru, ke la

lim-aranĝo 'a' en formoj similaj al diagramo 29, kutime valoras je "ekde 12 poentoj ĝis 14 poentoj".

{paĝo 56 de la origino}

Krome, por akiri la valoron '14 poentoj', ekzistas alia metodo iome pli konciza, tamen ĉi tie prezentis metodon teorie pli facile kompreneblan, kvankam iom malrektan.

Ĉiukaze, malfacile estas fari ĉi tian komplikan kalkulon dum reala ludo, pli bone memoru la valorojn de lim-aranĝoj, kiuj ofte aperas.